

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Guido Holz*

1. La luno nun ekhelas,  
Steletoj oraj belas  
En la ĉiela klar';  
L'arbaro nigra revas,  
Kaj el herbejo levas  
Mirige sin nebula mar'.
2. Silenta estas mondo  
Kaj en krepuska rondo  
Hejmecas kun favor'!  
Similas kalman ĉelon,  
En kiu vi kverelon  
De l'tago dorme pelu for.
3. Ĉu vi la lunon konas?  
Aspekto nur duonas,  
Sed rondas ĝi en bel'.  
Do ankaŭ estas multo,  
Loganta al insulto,  
Okulojn ĝenas la malhel'.
4. Ni homoj tiel vantaj  
Ja estas nur pekantaj,  
Malvasta nia sci';  
Ĥimerojn ni eltrikas,  
Ni multe artifikas  
Kaj perdas celon pli kaj pli.
5. Vidigu, Dio, savon,  
Pasem' ne veku raven,  
Ne ĝoju ni pro glori!  
Fariĝu malafektaj  
Ni kaj al vi respektaj,  
Infane gaju nia kor'!
6. Vi gracu, sen ĉagreni  
El mondo nin forpreni  
Al fin' per milda mort'!  
Kaj post forpren' fidele  
Hejmigu nin ĉiele,  
Sinjoro, Dio, nia fort'!

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Adolf Burkhardt*

1. Leviĝas luno; hele  
orpompas surĉiele  
la steloj al l'okul'.  
Arbaro mute revas;  
el la herbej' sin levas  
mirinde blanka la nebul'
2. Ripozas mont' kaj valo  
sub la krepusk-vualo  
trankvile kvazaŭ lag'.  
Por vi jen la permeso  
fordormi en forgeso  
la malbonaĵojn de la tag'.
3. La luno nur duone  
Prezentas sin impone;  
ĝi tamen estas sfer':  
Facile ni priridas  
aferon, se ni vidas  
nur parton de la plena ver'.
4. Homidoj ni fieraj  
pekuloj nur, mizeraj;  
ne multon scias ni.  
Ni teksas iluziojn  
kaj serĉas multajn sciojn  
kaj devojiĝas pli kaj pli.
5. Ho Di', nin lasu vidi  
la Savon, ne plu fidi  
vantaĵojn de l' pasem'!  
Nin faru simpl-animaj,  
infane Dio-timaj  
en ĝoj', jam nun sen zorga trem'!
6. Vi fine, sen ĉagreni,  
el mond' nin volu preni  
per milda morto for.  
Nin tiam al ĉielo  
venigu, al la celo:  
Vi, nia Dio kaj Sinjor'!

...

7. Kuŝiĝu do kun pio  
 Vi en la nom' de Dio,  
 Jam fridas nokta vent'.  
 Per punoj, Di', ne ĝenu,  
 Per dolĉa dorm' nin benu,  
 Najbaron ankaŭ en turment'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 - †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!  
 Vin nokta vent' ne tuŝu,  
 dum ŝirmas anĝelar'.  
 Indulgu, Di', nin grace,  
 por ke nun dormu pace  
 ni kaj malsana la najbar'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 - †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kantlibreto "Mia kantaro I", dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*